

ELNA NEWSLETTER

NEWS OF THE LANGUAGE PROBLEM AND ESPERANTO AS A SOLUTION

Bimonthly organ of the Esperanto League for North America, Inc., Box 1129, El Cerrito, CA 94530 USA
Editor, Catherine L. Schulze; Graphics, William R. Harmon. Includes promotional section in English and
informational section in Esperanto for ELNA members. ISSN 0030-5065. Vol. 15, No. 2 - Mar.-Apr. 1979



By Bill Olendorf

GOLDEN GATE BRIDGE

SUMMER 1979 — FLOAT 48 DAYS IN ESPERANTOLAND!



INSIDE:
CONVENTION HIGHLIGHTS
Holiday Opportunities Abound
in Summer, 1979

Write to Newsletter Editor
Cathy Schulze
for details on plans
which interest YOU

410 Darrell Road
Hillsborough CA 94010

LIBRARY NEWS

Helping Alma Mater and Esperanto

Two Esperantists have recently donated sums of \$100 each to the libraries of their "alma maters" through the ELNA Central Office for the purchase of books in and about Esperanto.

The CO sent notices of the donation to the universities along with special catalogues of suggested books. The universities were grateful for the donations and, in one case, the university library ordered books in excess of the credit provided by the donation.

To readers desiring to make similar gifts the ELNA office will gladly furnish details upon request.

University of Oregon Library (Eugene) announces the completion of cataloguing of the George A. Connor Esperanto Collection (approximately 2500 books) donated by Mrs. Doris Tappan Connor.

The work was completed in one and one-half years by graduate student librarians Karin Smith and Susan Haake. The catalogue costs \$5 and is available from Edward Kemp, Acquisitions-Special Collections, University of Oregon Library, Eugene, OR 97403.

Public Library Cochran, PA featured an Esperanto display during March arranged by Display Chairman, Conrad Fisher.

Fort Worth Public Library issues its lively monthly events bulletin also in an Esperanto translation by Michael Jones.

International Esperanto Museum, located in the Austrian National Library, Vienna, in its first quarter 1979 *Informilo* traces the very impressive fifty-year history of the Museum which is supported by the Austrian Government and Esperantists. Visitors to Vienna will find there the largest collection of Esperanto books and memorabilia in the world. Subscribers to the quarterly bulletin send \$1.75 to Julie Regal, 310 Fourth St., Downers Grove IL 60515.

Library Gift: To bring your local school and public libraries up to date, send a check to ELNA for \$2.50 with the name, address and zip code of your library. ELNA will send for their vertical file on Esperanto the following:

- A catalogue of suggested books for libraries
- A sample copy of *ELNA Newsletter*
- *ESPERANTO AND INTERNATIONAL LANGUAGE PROBLEMS: A research Bibliography* by Humphrey Tonkin.

SKOLTA MONDO, the Esperanto magazine for Scouts (Jan. 1978) reported: "In south Ireland there are two boy and two girl scout organizations, one "open" and one Catholic for each sex."

SKOLTA MONDO (Feb. 1978) shows a Norwegian girl scout adjusting the slide on the neckerchief of a boy scout. Below the photo appears the text: "Until now there were three scout associations in Norway, one for the girls who belong to the YWCA and a neutral one for other girls, as well as a neutral one for all boys. Now the latter two are united. Boys in the YMCA have their own scout association."

(trans. by Conrad Fisher)

NOTE: In the 1908 edition of *Scouting for Boys*, Lord Robert Baden-Powell, founder of the scout movement, recommended that scouts learn and use Esperanto for international contacts.

ELNA SCHOLARSHIPS

--A good investment in the Esperanto-speaking community. Each summer the generosity of local clubs and individuals makes it possible for bright young students to pursue advanced Esperanto studies at San Francisco State University. To be considered, such students must be thoroughly conversant with basic Esperanto.

- Students desiring to apply for a scholarship, and individuals desiring to contribute to the Fund, contact:

Scholarships for Students Fund
c/o Cathy Schulze
410 Darrell Road
Hillsborough CA 94010

ESPERANTO, ENGLISH FEET, METRIC TOES is the heading above a letter in the *Chronicle of Higher Education* (undated) by Bruce A. Sherwood, Asst. Director, Computer-Based Education, Research Laboratory and Associate Professor of Physics, University of Illinois-Urbana. Responding to an unthinking statement in a January 22 article on the metric system in which it was stated, "...it's a lot quicker and easier to let some of the world learn English than it is to require the whole world to learn a brand new language." Mr. Sherwood asks: "Quicker and easier for whom?"

Continuing, he says "There are approximately 350 million native speakers of English. If we don't have to study foreign languages but 3650 million foreigners have to study English for four years, the total educational effort is 14,600 million man-years. If, on the other hand, all 4,000 million humans agree to study Esperanto for one year, the educational effort reduces drastically to 4,000 million man-years, less than one-third the effort! Moreover, this would be a much fairer arrangement, eliminating a heavy burden on non-English speakers and the discriminatory privileges granted to native English speakers, who are already privileged in other ways. It is not efficiency that has propelled English, but power. With...the increasing claim of other languages for their place...we will be forced to agree to learn Esperanto, just as others were forced in the past to learn English."

The Guardian (London) Dec. 8, 1978 carried an article indicating that Esperanto is alive and well in England where about 1,000 children are learning the international language, and 74 members of the House of Commons have formed an Esperanto Parliamentary Group. Estimating that use of Esperanto as a second common language would cut by 55% the amount which the European Parliament now spends on translating and at the UN by 52 million Pounds a year, the article states further: "...it is only the most cynical who point out that the previous occasions when Esperanto looked ready for the great breakthrough were followed by World Wars One and Two."

A vigorous public information campaign by the British Esperanto Association has resulted in programs about Esperanto including 13 on TV, 9 daily national newspapers, 17 interviews on national radio, 31 local radio interviews and 13 articles in regional dailies.

ESPERANTO HAS A WORD FOR IT. *THE CANADIAN* (Feb. 17) a weekly magazine, in a full page on Esperanto, cited the unique word-building possible in Esperanto - everything from the "invented" word "edzo" (husband) and that universally sought "necessary place"; the "necesejo" (the toilet).

BONVENON AL NOVAJ MEMBROJ (ĝis 12a aprilo 1979)

Rev. Wilbur O. Fogg, 4719 O'Meara Dr. Houston TX 77035
 Anne Smith, 715 N. Paulina Av. Redondo Beach CA 90277
 Genevieve Hautala, PO Box 1862, Honolulu HI 96805
 Mrs. H. L. Shoemaker, 28 S. University, Fayetteville AR 72701
 Sandy Winberg, 34445 Sherwood Dr. Solon OH 44139
 Fari Mizban, 440 David Ct #1616, San Francisco CA 94111
 H. Elwin Reed, 11420 Biona Dr. Los Angeles CA 90066
 Anne P. Linares, Flagler Box 012861, Miami FO 33101
 Doug Portmann, Box 124, New Martinsville WV 26155
 Albert T. Wickham 624 S Berendo #407 Los Angeles CA 90020
 Helen L. Bradley, Box 501, Clearlake Park CA 95424
 Star Przybilla, Box 62, Whitehall WI 54773
 Gunther A Goetz, 2025 Crestwood, Denton TX 76201

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ:

Harold Foulds
 Michael C. MacCannell
 Yvette Massey
 Ralph M. Murphy
 Eric Sperling
 Elizabeth O'Brien Stafford

POTPOURRI

21a Kanada Kongreso de Esperanto, Chateau Laurier, Ottawa, 29-junio — 2-julio 1979. Petu aliĝilon de la LKK: Esperanto-Kongreso, PO Kesto 9482, Ottawa, Ont. K1G 3V2 Kanado.

Oregon State University - Corvallis is offering a one-credit Esperanto Course in the spring University Honors Program under the direction of Carleton W. Carroll of the Dept. of Foreign Languages and Literature.

"The International Communications of Service Club Associations" is the subject of a public forum at Chicago YMCA Bldg., 29 W. Randolph St., May 4. Speakers will be representatives of Lions, Kiwanis, and Rotary Clubs, according to Janet Bixby, President, Esperanto Society of Chicago.

Chicago Sun Times, April 19 reported a suit on behalf of a Chinese man held in Illinois mental institutions for 28 years. He was diagnosed severely retarded by a doctor who spoke only English and Spanish. No, Virginia, they don't all speak English.

Typewriters and Esperanto supersigns. Smith-Corona has a changeable type selection at \$2 per unit, according to John Massey and Ward Giannini who've checked on this. IBM Selectric provides various supersigns on its "library" ball.

COIN WORLD INTERNATIONAL Dec. 27, 1978 pictures the one-stelo bronze Esperanto coin.

THE PHILATELIC JOURNALIST offered a "Cachet for International Friendship Week." Featured is a green and black cacheted cover with the clasped hands emblem and the words "Friendship Across Borders" in English and Esperanto. These are available at \$1 each, 3 for \$2.75, or 6 for \$5, from: Philatelic Journalist, Box 150, Clinton Corners NY 12514. Stamped addressed #10 envelopes must be sent with each order so the covers may be sent unaddressed.

WINDFALL (Vol. 3, No. 1, Winter 1978), a literary anthology, published for faculty and students of Northeast Missouri State University, carried a short article about Esperanto by Tom Reid.

ANONCOJ

ELNA-Arkivoj. Ne forĵetu Esperantaĵojn. Kio estas al vi balasto estos trezoro al la ELNA-Arkivisto. Sendu al: D-ro B. J. Balcar, 62 Via Castanada, Monterey, CA 93940.

Averto al Entuziasmuloj: Antaŭ ol lasi Esperanto-informilojn en publikaj lokoj - bibliotekoj, frizejoj, butikoj, k.s., estu certa ke vi ricevas permeson de la ĝusta instanco. Ne embarasigu la Esperanto-movadon!

Esperanto-Kultura Centro de Bergamo, naskiĝloko de Papo Johano XXIII, kaj de la komponisto Donizetti, petas donacojn de superflua Esperantaĵoj por ĝia muzeo: libroj, periodaĵoj, insignoj, ktp.

Filatelistoj povas aĉeti kontraŭ internacia poŝtmandato en sumo de \$4 albumon por kolekti Esperanto-poŝtmarkojn. Mendu ĉe: Editions Francaises de Esperanto, 11 rue Paul-Vergnes, Marmandes (L-et-C) France.

Ekspozicion de pk de naciaj kostumoj, folkloraj kutimoj por simboli interpopolan amikecon aranĝas la Esperanto-Grupo en Budapeŝt. Sendu al: Dobos Ferenc, BUDAPEST H-1191, Hungary.

DE BULGARUJO AL VENEZUELO TROVU KORESPONDANTON!

Bulgaria: F-ino Svetland Anders, 16-jara, ul. Popovo 7800, st. "M. Nikolov" 47.

Esthonia USSR: Edmund Jaan, 202950 ABJAPK 27, Agronomo kaj UEA delegito.

Iran: Uahid Wishlagi, 23-jara, 172 Rokhodiny golstany, Hartchanav, Tehran.

Maghsud Ghanavatian, No. 14 Ladan St., Laŝkar St., Ahvazo.

Japan: Chikayuki Matsumoto, 25-jara fraulo, terkulturisto, 301 Sakurazawa, Yorii-machi, Saitama 369-12.

E. Germany DDR: Wolfgang Hofmann, 39-jara diplomita ingenier-ekonomo por masinkonstruo, Káthe-Kollwitz-Str. 24, 7144 Schkeuditz (apud Leipzig).

Ronald Schindler, DDR-209 Templin, Wilhelm-Pieck Str. 44, pri pm, bk, 'varmega' muziko.

HUNGARY: Gabuai Sándor, 21-jara teknikisto, pri sporto kaj naturo, Dunakesi, Zn'uyi: Miklós 13, H-2120.

Gyorgy Mezödi (en 8a grado), 7629 Zalka Maté, út. 2.

Zsolt Zarándi, 15-jara, bk, pm. Magyarorszag, 3881 Aboey-santo, Kaŝsay, ut. 11-13.

POLAND: Danuta Hajduk, 41-500 Chorzow I, Zielona 12, pri sporto, filmoj, turismo.

Borc Wieszlaw, 45-jara, 58-309 Wałbrzych, ul. Duracza 7/10, ankau 15-jara filo kaj 10-jara filino deziras korespondi.

ROUMANIA: Jecza Tiberiu, Str. Muzelor nr. 1, Bl. 12, Sc.A, Ap.49, 4000-Sf. Gheorghe (jurnalisto, literaturo, muziko, arto)

VENEZUELA: Marisela Arebalo R., jurnalisto, Ave. Bogota, Edif. Marben, Aptdo C, Los Caobos, Caracas.

QUINTO LINGO, Vol. 17, No. 1, 1979, carried a letter from Wallace du Temple of British Columbia about the suitability of Esperanto as a second language for children, citing the naturalness with which his two children use Esperanto. Esperanto was the language of romance between Mr. du Temple and his Czech wife, Olga.



"...MI LASIS MIAN KORON - EN SAN FRANCISCO..."

27TH ELNA CONVENTION - PROGRAM HIGHLIGHTS

Friday			
13 July	Evening		INTERKONA VESPERO - Music and Refreshments
Saturday	Morning		CONVENTION OPENS - Presentation of Mr. T. Yuri of Ashiya, Japan, and other honored guests
14 July	Afternoon		SPECIAL PUBLIC EVENT: Dr. Richard L. Trapp, Assoc. Dean, School of Humanities, SFSU, will present Dr. Robert W. Blair, Professor, Dept. of Linguistics, Brigham Young University who will demonstrate a methodology he has developed using ESPERANTO AS A FOUNDATION FOR LANGUAGE LEARNING
			YEAR OF THE CHILD - Presentation by Esperanto Class of West Novato School Instructor: Janet Brugos Young
	Evening		BANQUET at Rockaway Beach, overlooking the Pacific • Entertainment - Alberta Casey, the Esperanto Diva • Music and Dancing
Sunday			
15 July	Morning		BRUNCH at The Sawmill - Across Golden Gate Bridge • Trip to Muir Woods - the Giant Redwoods
	Afternoon		• Ferry Ride on San Francisco Bay
	Evening		• "Pizza and Pipes" in Serramonte - giant Wurlitzer (no host)
Monday	Daytime		BACK TO WORK - meetings all day, open to all (Esperanto spoken)
16 July	Evening		• Playtime for some (perhaps to get your hair done?) • Metropolitan Museum of Art Tutankhamun slides - Dr. David K. Jordan
Tuesday	Daytime		Same as for Monday
17 July			• Reception for UEA Delegates - Hostess, Ĉefdelegito Bonnie Helmuth • Farewell Lounge Party - early to bed - off to Switzerland in the morning!

NOTES:

All meals on Monday and Tuesday are at the University Dining Room.

No meals served on campus Saturday or Sunday [restaurants near, if not on tour]

Tea/Coffee breaks at all business meetings.

Tea/Coffee/Pastry "Continental Breakfast" Saturday morning during meeting.

Send in your registration
for the Convention today!!
Extra forms available from
the ELNA Central Office.

WILL THEY BE READY?

In a *New York Times* article James Reston writes of the 6-year-olds who entered first grade in Fall 1978. They will be 33 at the end of the 20th century "...and the assumption is that they will then be ready to meet the problems of a new century.

"But will they be ready? This depends largely on whether they are educated for the world that is coming or for the world that is going... In the field of education, the 21st century is now."

Edwin O. Reischauer, professor of history at Harvard and former United States Ambassador to Japan, in a new book, *Toward the 21st Century - Education for a Changing World* revives the question previously asked by H.G. Wells, How are we to educate for the future rather than for the past?

SIGNS OF AWAKENING

The *President's Commission on Foreign Language and International Studies* was appointed by President Carter on Sept. 15, 1978, for the purpose of recommending ways to strengthen and improve the study of foreign language and international studies in four areas: public awareness, needs for language and area specialists, appropriate study programs for all educational levels, and resources and legislation required to accomplish the task. A final report is to be presented to the President in October, 1979.

Public meetings and hearings are being held in several major American cities. ELNA members were present at a public meeting in New York and at regional hearings in Chicago, San Francisco, and Houston. Future hearings will be held in Raleigh and Boston, and final meetings will be held in Washington, DC.

In addition to oral presentations, ELNA prepared a dossier to be presented to each member of the Commission, containing a position statement of ELNA and of AATE, and several articles relating to the educational value of Esperanto.

Members of the Commission who are also Members of Congress are:

Millicent Fenwick, Representative, New Jersey
Mark O. Hatfield, Senator, Oregon
Leon E. Panetta, Representative, California
Paul Simon, Representative, Illinois

ELNA members desiring to send their views may contact Senator Hatfield at the Senate Office Building, Washington DC 20510. Letters to Representatives should be addressed to: House Office Building, Washington DC 20515.

...Donald Harlow, Director, ELNA CO

The Southeastern Regional Hearing of the *President's Commission on Foreign Language and International Studies* at Raleigh NC April 12-13 was attended by **Gizella Edwards** who teaches Esperanto at the Learning Center for the Gifted, Tampa Florida, and **Prof. Eugene H. Thompson** representing Guilford College, Greensboro NC. The Rev. Timothy S. Healy, President of Georgetown University presided and Humphrey Tonkin, President of the Universal Esperanto Association, represented the International Studies program at the University of Pennsylvania. Esperanto was well represented during the hearings.

...Prof. E. H. Thompson



ELNA dedicates the UN YEAR OF THE CHILD to the premise that every child who wants to should have the chance to learn Esperanto. Leading the way —

- **LEARNING CENTER FOR THE GIFTED, Tampa, Florida** where Esperanto is taught by **Gizella Edwards**.
- **State of Hawaii Public Schools** where sixth graders study a unit on the international language.
- **Napa, Calif., Martha Walker, instructor.**
- **West Novato, CA School grades 1 - 5, Janet Brugos Young, instructor.**

DE VIA PREZIDANTO:

Lastatempe evidentigas, ke la Centra Oficejo tre bezonas instali novan skribmaŝinon, precipe IBM Selectric-specon, kiu ebligos pli rapidan kaj belaspektan preparadon de diversaj materialoj uzataj por antaŭenigi nian celon por Esperanto en Usono.

Al tiu celo, speciala donac-kaso estis apartigita, kaj post anonco pri la bezono ĉe la ĵus-okazinta Tut-Kalifornia Esperanto Konferenco en Asilomar, kelkaj bonkoregaj homoj bele flugigis la aferon per malavaraĵ donacoj sumante pli ol \$400. La tuta sumo bezonata estas proks. \$900, kaj tiuj, kiuj volas fari specialan donacon por ĉi tiu inda celo povas sendi ĉekon al la Centra Oficejo de ELNA, Box 1129, El Cerrito, CA 94530, indikante aŭ sur la ĉeko aŭ per aparta papero ke la donaco estas celita al la "Fonduso Skribmaŝina."

Tiuj el vi kiuj estis membroj de ELNA dum pli ol tri aŭ kvar jaroj konstatos, ke dum tiu tempo ELNA ne ofte aŭ insiste petis donacojn. Certe la konstante ricevataj donacoj al la ĝenerala kaso de ELNA tre helpas la Ligon kaj ties laboron finance. Sed tuj post mia elekto mi decidis, ke ĉiel eble la Ligo evitos la konstantan almoŝpetadon kiu tiel malallogas afliktas multajn aliajn senprofitcelajn kaj karitatajn organizojn. Ni sukcesis plisolidigi la financon bazon de la Ligo sen fari tiel. Tamen nun la specifa celo de akiri pli modernan ilon por la Ligo indigas specialan peton al tiuj, kiuj emas malavare dividi sian financon bonsorton kun Esperanto. Ni publikigos liston de tiuj donacantoj en posta *Newsletter*, kaj mi antaŭokaze esprimas elkorajn dankojn al tiuj fervoraj subtenantoj de Esperanto.

En la majo-junio numero de *Newsletter* mi raportos, laŭ la Statuta devigo, ĉiujn decidojn de la Estraro kaj la Prezidanto ekde la lasta tia raporto. Mi urĝas al ĉiuj ELNA-anoj, ke ili ĉestu la jarkunvenon ĉe San Francisco State por tie diskuti gravajn planojn por la estonteco. Estrara kunsido okazos dum tiu kongreso, kaj kiel en la pasinteco, la kunsidoj de via Estraro estas malfermaj al ĉiuj membroj de la Ligo. Ni bonvenigas ĉeestantojn.

Al ĉiu membro la CO enpoŝtigis lastan semajnon la novan *Adresaron*, biografian informon pri la kandidatoj, balotilon, kaj informilon-aligilon por la ELNA Kongreso en 1979. Nepre nun planu veni al bela San Francisco por partopreni la kongreson. La programo estos interesa, kaj la ekskursoj estis speciale elektitaj de la LKK-Estraro, Cathy Schulze, esti nemultekostaj kaj allogaj. La loĝkosto ĉe San Francisco State estas ja bonaĉeto, kompare kun la loĝkosto en preskaŭ iu hotelo en grandurbo. Venu, kaj ĝuu la Esperantan Etoŝon en San Francisco en ĉi tiu julio! Mi esperas vidi vin ĉiuj tie!

...Wm. R. Harmon

LOKAJ NOTOJ

Mark Starr, Honora Membro de ELNA, festas sian 85-jaran datrevenon je 27a aprilo. Kun la helpo de D-ro Julius Manson, Mark instruas kursojn ĉe Stuyvesant Vespera Lernejo en Novjorko. Gratulojn al Mark kaj al Julius, antaŭe studento de Mark.

Maria Gerson, M.D., Prezidanto de Boston Esperanto-Klubo en majo vizitas Hamburgon kiel ambasadoro de bonvolo por la urbo Boston. La diversaj ambasadoroj kunvojaĝantaj estos gastoj en familioj de Hamburgo kun similaj profesioj. En kvar tagoj kun unu familio ili reciproke lernos pri kulturo; en postaj kvar tagoj kun alia familio ili ekskursos aŭ promenos libervole.

TRADUKILOJ

Lastatempe du grandaj usonaj kompanioj pretendas eldoni tradukilojn por la ordinara vojaĝanto. Ne temas pri grandaj tradukmaŝinoj, kiuj plenigas tutan ĉambron, sed pri malgrandaj enmanigeblaj maŝinoj, kiel poŝkalkuliloj, kiujn oni povas utiligi por transalti la lingvan barilon.

Unu el tiuj maŝinoj estas la **LEXICON LK-3000**; la alia estas la **CRAIG TRANSLATOR**. Ambaŭ proponas la lingvojn hispanan, francan, italan, germanan, kaj japanan; la LK-3000 krome havebligas la portugalan, rusan, kaj grekan. La LK-3000 kostas \$225 kun unu lingvo; memoraroj kun aldonaj lingvoj kostas po \$65. La *Translator* kostas \$199.95 kun anglalingva kartuĉo; ekstraj kartuĉoj kostas po \$24.95.

Mi ankoraŭ ne vidis unu el tiuj tradukiloj, sed laŭ la reklamoj ili ŝajnas esti sufiĉe superaj al simpla Berlitz-frazaro, almenaŭ pro tio, ke estas tre facile trovi vorton aŭ frazon. La uzanto devas nur altajpi la ĝustan vorton en la angla lingvo, kaj la traduko en la celolingvo aperas sur la malgranda (unulinia) ekrano. La tradukiloj eĉ donas al la uzanto la kapablon elekti inter du signifoj de la sama anglalingva vorto.

Tamen la maŝinoj ne estas tiel utilaj, kiel la reklamoj volas onin kredigi. La Craig-reklamo insistas, ke "oni povas ... laŭlitere konversacii, ne dirante eĉ unu vorton." Per 50 frazoj kaj 7000 unuopaj vortoj??? Permesu, ke mi iomete dubu!

Unuavice, oni bezonas iom da imagokapablo por povi starigi demandojn aŭ respondojn en lingvo, kies gramatikon oni ne konas. Similan imagokapablon oni devas atendi ĉe la nekonata respondanto.

Duavice, la fabrikintoj ne klarigas, kion fari, se la uzanto renkontas homon, kiu estas analfabeta, kaj ne povas legi la vortojn sur la ekrano.

Eble pli taŭga uzo estus por la studado de iu fremda lingvo. Pere de la maŝino, oni povas parkeri vortaron kaj ekzameni sin pri tio. Tiamaniere, la "tradukiloj" povas fariĝi vere valoraj por la studanto de alilandaj lingvoj.

Sed kiel ilo por interpreti de unu lingvo al alia, la aŭtomata tradukilo ŝajnas esti ankoraŭ ne tute matura.

...Donald Harlow

Matematiko kaj Esperanto en Texas

Michael Jones parolis 6-aprilon en Lubbock TX ĉe la jarkunveno de Texas Filio de la Matematika Asocio de Usono pri la temo: *Matematiko kaj Esperanto*. Lia gastiganto estis D-ro Fred O. Meyer III. Jones estas unu el la Esperanto-motoroj en Texas kie li gvidas kursojn, tradukas Esperanten bultenojn de la Ft. Worth Publika Biblioteko, aktivas pri ŝak-aferoj. Li eldonis artikolon "La Neracionaleco de la Kvadrata Radiko de 2" pri kiu li diras ke "Ĝi estas klasika kaj ĉie instruata matematikaĵo, kaj la en-Esperanta artikolo, estante kaj la plej profunda traktado de tiu ĉi temo en la mondo kaj estante eĉ senkopirajta, povas efike helpi en ĉiuj matematik-klasoj en la mondo."

IMPRESOJ DE SRI LANKA

Ne depost la Konferenco de UNESKO en Montevideo en 1954 okazis pli streĉa strebado por Esperanto ol faris Vilma Eichholz dum decembro 1978. En la Kanada Esperanto-Revuo *LUMO* printempo, 1979, S-ino Eichholz priskribis sian agadon okaze de la Asembleo de la Asocio por Mondkonstitucio kaj Mondparlamento (AMM) kie si pledis por enkonduko de Esperanto. Tiun partoprenon ebligis la eminenta S-ino Dorothy Henderson, kiu finance subtenis la vojaĝ-kostojn por S-ino Eichholz.

Zorge preparante la kampanjon, S-ino Eichholz instruis du grupojn de personoj per la Cseh metodo en 14 lecionoj. Inter la kursanoj estis juristo, D-rino de lingvistiko, lernejestro, k.a. Poste en malgranda kunsido, hinda parlamentano, S-ro Kamath petis ke s-ino Eichholz diru ion en Esperanto. Skribis s-ino Eichholz, "Mi elektis legi la por ĉiuj en la angla bone konatan komenton de la Mondkonstitucio. Post tio mi proponis ke ili mem spertu kianivele oni post 14 lecionoj povas lerni Esperanton.

"Mi petis tiucele skribi kelkajn anglajn frazojn sur paperoj kiujn mi post silenta tralego laŭte tradukos esperanten... kaj la gekursanoj provos retraduko... anglen. Tio okazis. Senhezite ili kune tradukis kaj... la ĉeestantoj konstatis kun miro la korektecon de la retraduko."

Kvankam s-ino Eichholz jam en Kanado petis permeson alparoli la Asembleon venis la lasta tago de la konferenco sen sukceso. Plendante al Helen Tucker, iama prezidanto de Voco de Virinoj en Kanado, s-ino Tucker petis rajton diri finan vorton en la nomo de la Virina Komitato. "Emfazante la neceson de protektado de virinaj rajtoj ŝi menciis, ke 'ankaŭ en ĉi tiu organizo, virino kiu dufoje laŭorde submetis rezolucion, ne ricevis la rajton prezenti ĝin al diskutado. Kiel membro de Asemblea Gvidantaro kaj kiel estrino de la Virina Komitato, mi petas la Asemblean Prezidentaron, ke ni ĝustigu tion, malgraŭ la malfrua horo.'" S-ino Eichholz ricevis permeson legi la rezolucion sed ne restis tempo por ĝin diskuti.

Poste ŝi renkontis d-ron Mercieca kaj esprimis seniluziigon ke oni volis sovi Esperanton per neuzitan trakon kie ĝi mortu. Lia respondo estis: "Tute ne, ĉar mi ja estas la estro de la Eduka Komitato. Se okazus laŭ mia volo, ni dum venonta Asembleo ĉiuj parolos Esperante." Certe al la virinoj s-inoj Henderson, Eichholz kaj Tucker la Esperantistaro ŝuldas multe pro la fortaj streĉoj. Ĉu eventoj de la estonteco kronos ilian grandan laboron per sukceso?

(el raporto de Vilma Eichholz en la printempa numero de la Kanada Esperanto-revuo *LUMO*)

ATENTU LOKAJ KLUBOJ

La ELNA Oficejo ricevas bultenojn de pluraj lokaj kluboj. Al tiuj ni povas turni novajn Esperantistojn. Se via grupo ne regule informas la oficejon, tion faru por ke ni rekomendu vin al novuloj.

Okaze de la Internacia Jaro de la Infano, loka klubo aranĝos ekspozicion de infanaj desegnaĵoj en septembro, kiam bonvenaj estos sendaĵoj el tuta mondo. Sendu al: Esperanto-Societo de Oulu, Valtatie 6-8B, SF-90500 OULU 50 Finland.

Esperanto-Societo de Chicago aperigis reklamon pri Esperanto en la Chicago-eldono de *TIME* je 12a februaro. La klubanoj respondis al enketantoj. Ankaŭ en februaro ili festis la Semajnon de Internacia Amikeco.

In *One Language for the World*, first edition, Mario Pei [1901-1978] asked:

"What would happen if all the children in the world learned another language along with their own? Not just another language, but the same language?"

VACATION TRAVEL/STUDY OPPORTUNITIES

2-4 June, International Vacation School (IFA), La Chaux de Fonds (near Neuchatel, Switzerland). Send 2 International Reply Coupons for details, to: Internacia FERIA Altlernejo, BP 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Switzerland.

NOTE: La Chaux de Fonds has become an international language center where three independent but cooperating groups are based:

Center of Documentation library houses various materials in and about planned languages with a very sizeable collection on Volapuk.

Literatura Foiro, the fine Esperanto literary revue, is headquartered there.

Esperanto Cultural Center, a Swiss undertaking with international importance, carries on many activities; courses, cultural meetings, publishing, and more. It organizes IFA seminar. The first two buildings of the planned Edmund Privat Center have been acquired.

Fifth Summer Esperanto Workshop - Baltimore, 9-27 July 1979; Social Security Administration Bldg., Woodlawn, MD. Instructor, Thomas H. Goodman, UEA Delegate for Pedagogy in USA. For registration forms write to: Ann A. Beusch, Specialist in Foreign Languages, ESOL, and Bilingual Education, PO Box 8717, BWI Airport, Baltimore MD 21240; telephone 796-8300, Ext. 317, or to Mr. Goodman at 358-2817.

27th Esperanto Encampment, Lancov (near Znojmo), Czechoslovakia, 1-14 July; 15-28 July; 29 July-11 August. Courses and activities open only to those with thorough grasp of basic Esperanto. Tent or cabin accommodations; 5 meals daily. For registration write: Somera Esperanto-Tendaro, CS 674 01, Trebic, Czechoslovakia.

CORRECTIONS, PLEASE

Contrary to prior information, the Esperanto Correspondence Course offered by Province of British Columbia Ministry of Education is NOT available to U.S. residents, according to word received from the registrar.

NEW ELNA ADDRESS BOOK - IMPORTANT CORRECTION

Please correct the telephone number for Cathy Schulze, ELNA Newsletter editor, to: [415] 342-1796.

Please also examine your own listing in the ADRESARO to check its correctness. Advise any corrections to ELNA CO, Box 1129, El Cerrito CA 94530.

We are now informed that the item under "Potpourri" in the Nov-Dec 1978 Newsletter about the 7-language brochure for Oregon State University choir's tour erroneously attributed to Martha Deer the Esperanto translation therein. We should have credited Dr. Carleton W. Carroll of OSU Dept. of Foreign Languages and Literature.

ABONU AŬ REABONU

La Ĉinan Monatan Gazeton en Esperanto

EL POPOLA ĈINIO

Abonprezoj:

por 1 jaro	\$3.00
por 2 jaroj	\$4.50
por 3 jaroj	\$6.00

KLUBOJ! Varbu amase abonojn aŭ reabonojn al El Popola Ĉinio inter viaj klubanoj, kaj rekompense ricevu el Ĉinio memoraĵon kun ĉina stilo!

Sendu abonojn al la loka peranto: ELNA Centra Oficejo Box 1129 El Cerrito, CA 94530

Generala Distribuanto: Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN, P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Specimeno kaj Abonvarbilo Senpage Akirebla Laŭpete

RENEW YOUR ELNA-UEA MEMBERSHIPS TODAY!



ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA BOX 1129, El Cerrito CA 94530

Enclosed is \$ _____ for new membership in ELNA for the year 1979. renewal

NAME _____
ADDRESS _____
CITY _____ STATE _____ ZIP _____

Name and address of each new member published in ELNA Newsletter and next edition of ELNA-Adresaro unless member indicates otherwise.

Check correct category: Regular (\$15) Family (\$22.50) Youth (18 or under) (\$7.50) Student (full-time, 25 or under) (\$7.50) Senior (renewal only, 65 or over) (\$7.50) Life (\$300)

DATE OF BIRTH (if applying for Youth, Student or Senior rate) _____

OPTIONAL INFORMATION

Telephone number: Area code () _____ OK to publish phone and/or call letters in ELNA-Adresaro? Yes No
Radio call letters (if applicable): _____

'CROCODILE' AN ENDANGERED SPECIES?

Summer 1979 offers 48 consecutive days - *a month and a half* - of continuous exposure to Esperanto. This is the most comprehensive program to date in which San Francisco State University has participated:

25 June - 13 July: Tenth annual Esperanto courses, San Francisco State University; includes basic course for gifted students, 3 levels, 3 units.


13-17 July: Annual Convention, Esperanto League for North America, San Francisco State University, San Francisco CA.

18-28 July: Locarno, Switzerland: San Francisco State University Overseas Esperanto Symposium featuring William Auld, litterateur.

28 July-4 August: 64th Universal Esperanto Association Convention, Lucerne, Switzerland.

With a call to "Stamp out 'Crocodiles' " Dr. David Jordan (University of California - San Diego) has designed the summer courses toward that end. In a speech before the national convention of *Alpha Mu Gamma*, a language honor society, at Thousand Oaks, CA on April 7, Dr. Jordan said in part: "Actually I suspect that three weeks of intensive exposure to a language that a smart high school student can actually learn in that time is probably a good investment since it sensitizes one to all sorts of aspects of language, linguistics, and sociolinguistics (as well as the international order) that one wouldn't begin to get studying another language where progress would be much slower, and the experience confined pretty much to first and second year textbooks..."

For Travel Information, contact:
ELNA TOURS, Horizons Travel Service, 928A Sir Francis Drake Blvd., Kentfield, CA - [415] 459-1313.



David Jordan selects books
at ELNA BOOK SERVICE
for Esperanto courses at
San Francisco State University
25 June - 13 July 1979.

PLEASE IMMEDIATELY NOTIFY THE ELNA CO OF ANY
CHANGE OF ADDRESS OR TELEPHONE NUMBER.

Esperanto League for North America

P.O. Box 1129
El Cerrito, CA 94530
Usono/USA



NEWS - PLEASE EXPEDITE

Nonprofit Organization
U.S. POSTAGE
PAID
Berkeley, CA
Permit No. 330

Address Correction Requested
Return Postage Guaranteed